pdf. iompostiom .net 013

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj medioj

Esperante

Scienca konferenco kun amasa partopreno de esperantistoj

Legu la plenan artikolon en Libera Folio

La 18-19-an de majo, 2007 en Kaŭno, Litovio, okazis la internacia interfaka scienca konferenco FIHUSO 2007. Partoprenis la konferencon fakuloj pri fizikaj, humanismaj kaj sociaj sciencoj. La konferencon organizis Kaŭna humanisma fakultato de Vilniusa universitato.

La konferencon partoprenis 204 personoj el 33 landoj. Okazis plenkunsido kaj kunsidoj en la kvin sekcioj informadiko, lingvistiko kaj literaturo, interlingvistiko, ekonomiko kaj entreprenado. La konferenco estis tre vasta kaj diversflanka, kaj Esperanto kaj esperantistoj havis grandan rolon en ĝi. Verŝajne, estas la unua fojo en la mondo, kiam en ĝenerala scienca konferenco tiom multe da atento estis dediĉita al Esperanto kaj al prelegoj en Esperanto.

Informe

Etnismo en la reto

La nro 78 (majo 2006) de la revuo Etnismo, informilo pri etnaj problemoj, nun legeblas enrete: http://www.geocities.com/ikeldv/Etnismo.html

Homaj Rajtoj

Saluton kara leganto!

Kun plezuro ni prezentas 30 Esperante subtitolitajn filmetojn pri Homaj Rajtoj (vidu: http://www.homajrajtoj.org). Do, la filmoj pri la Universalaj Homaj Rajtoj nun disponeblas en la Universala Lingvo! Per ĉi tiuj filmoj ni volas promocii la Homajn Rajtojn kaj ni petas vian helpon. Vi ekzemple povus publikigi unu el la filmetoj en via retpaĝaro (tio eblas per YouTube-kodo) aŭ alimaniere atentigi vian membraron pri Homaj Rajtoj. Ĉu vi volas nin helpi disvastigi?

Agende

Mezepoka semajnfino

Preparu vian vojaĝon al Mezepoko! Vi estas invititaj de Esperanto Rennes dum la semajnfino de vendredon 22a vespere ĝis dimanĉon 24a de junio, en Kasteleto, por mezepoka programo!

La kasteleto Mesneuf de 15a jarcento, situas en la kamparo, en Bourgbarré, 15 km sude de Rennes en grandega parko. La komforto de la kasteleto estas tre simpla. Se vi deziras liton, rezervu sufiĉe frue!

Eblos ankau tendumi en la parko.

Informoj: http://esperanto.rennes.free.fr/

Movade

Rusianoj pretas kongresi en Moskvo sen UEA

Legu la plenan artikolon en Libera Folio

La decido de UEA ne aranĝi la Universalan Kongreson en Moskvo en la jaro 2009 kaŭzis akrajn disputojn interne de Rusia Esperanto-Unio. Krome REU sendis al UEA kritikan leteron, en kiu UEA estas akuzata pri neglektado de la proponoj de REU. [...] REU-anoj ankaŭ ekdiskutis la ideon organizi propan internacian kongreson honore al "nia fama samlandano", Ludoviko Zamenhof.